
IPR

Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031
Jarkolekto 55 - trimonata
2025/1

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:
József Németh (red.)
Mireille Grosjean
Luigia Oberrauch Madella
Ahmad Reza Mamduhi
Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:
Laura Brazzabeni
Luiza Carol
Petro Chrdle
Mireille Grosjean
Ilona Koutny
Aranka Laslo
Liu Miao Xue
Stefan MacGill
Alessandra Madella
Ahmad Reza Mamduhi
Aime Patrick Manirakiza
Radojica Petrovič
Bardhyl Selimi
Sunaga Satoŝi
Renée Triolle
Bojan Veličković
Yu Jianchao



ilei

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ENHAVO

Enkonduko (Ahmad Reza MAMDUHI) 3
SUNAGA Satoŝi: *La Infanoj de la Mondo kaj ties redakta procezo* 4
Ilona KOUTNY: *Terminologio de supera instruado/edukado* 9
Renée TRIOLLE: *Internacia Konferenco de la NRO-oj […]* 12
Liu Miao xue: *Esperanto en miaj okuloj* 14
Mireille GROSJEAN: *Brila leciono pri pedagogio* 16
El la landoj kaj sekcioj (AL, BR, BI, CN, FR, CH) 18
Fino de la Esperanto-fako de KAVAPECH (Petro CHRDLE) 28
Novaĵoj de Stefan MACGILL 31
Dua alvoko al la ILEI-Kongreso 2025 – Beogrado, Serbio (LKK) 32
Informoj pri ILEI, adresaro de sekcioj, reprezentantoj, kontaktpersonoj ... 36

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Ahmad Reza MAMDUHI, Nr. 9, K. Iraj, Kh. Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-Afshar, Kh.Vahid Dastgerdi, Tehran-1916613514, Irano. Tel. +98 9122115419 (Telegram, WhatsApp). <*mamduhi@gmail.com*>. Universitata agado, ekstera komunikado kaj varbado, observanto kaj komitatano A ĉe UEA.

Sekretario: Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. +7 919-670-25-34. <*lena_espero@mail.ru*>. Lerneja agado.

Estrarano pri financoj: Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio. *ilei.kasisto@gmail.com* (financoj). Tel.+374 55 279906 (Viber, WhatsApp), <*karinko_arm@mail.ru*>. Ekzamenoj.

Vic-prezidanto: Alessandra MADELLA, via Prampolini 8, IT-43122 Parma, Italio. Tel. +39 0521 785582, <*a.madella@tiscali.it*>. Lerneja, universitata, scienca, landa kaj regiona agadoj (Orienta Azio), ekstera komunikado kaj varbado.

Estrarano pri kongresoj: Laura BRAZZABENI, via San Filippo 52, IT-58031 Arcidosso (GR), Italio. <*laura.brazzabeni@gmail.com*>. Tel. +39 3286461063 (WhatsApp). Lerneja agado.

Estrarano: Marija JERKOVIĆ, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Tel. +385 981771741. <*mjerkovic@net.hr*>. Lerneja kaj landa agadoj.

Estrarano: Fernando PITA, R. S. Francisco Xavier, 681, bl E, ap 201, Maracanã - cep: 20550-011, Rio-de-Ĵanejro, Brazilo. <*magisterpita@gmail.com*>. Tel. +55 21 98863-3854 (Telegram, WhatsApp). IPR, universitata kaj scienca agadoj.

Estrarano: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. <*radojica.petrovic.rs@gmail.com*>. Tel. +381 64 8525321 (Viber, WhatsApp, Telegram). Eduk-projektoj, universitata agado, instrukapabligado.

Estrarano: Aimé-Patrick MANIRAKIZA, Buhomba 7 Nr 39, Maramvya, Bujumbura, Burundo, Tel. +25779813485 (Whatsapp, Telegramo), <*apmanirakiza@gmail.com*>. Agado pri Afriko, observanto ĉe TEJO.

Scienca Komitato

***Prezidanto*: Humphrey Tonkin**, Usono, University of Hartford
***Membroj*:**
Duncan Charters, Usono, Principia College, Elsah; AdE[1]
Renato Corsetti, Britio/Italio, Università degli Studi di Roma „La Sapienza"; AdE[1]
Probal Dasgupta, Barato, emerita profesoro de LRU, Indian Statistical Institute, Kolkata; AdE[1]
Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių universitetas
Boris Kolker, Usono; AdE[1]
Ilona Koutny, Pollando/Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu
Stefan MacGill, Nov-Zelando/ Hungario
Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения, AdE[1]
Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet u Kragujevcu
Balázs Wacha, Hungario, MTA Nyelvtudományi Intézet

[1] AdE – Akademio de Esperanto

Sur la titolpaĝo: Veliki Buk, la „Granda Bruo", unu el la plej altaj kaj plej belaj akvofaloj en Serbio. Kadre de la ILEI-Kongreso oni povos viziti ĝin. (vd. la Duan alvokon de la Kongreso sur p. 32)

Enkonduko

Karaj legantoj!

Kiel bele videblas surkovrile, tiu ĉi numero detale informas vin ankaŭ pri nia ĉi-jara Kongreso en Beogrado, Serbio. Bonvenon al la Kongreso kaj la Simpozio de ILEI, kiuj same kiel la lasta jaro okazos hibride.

La unua artikolo de la nuna numero (paĝo 4) fare de nia japana samideano SUNAGA Satoŝi vere pensigis min, kiel antaŭ la interreto kaj retpoŝto oni povis per vere testudrapida poŝto de la 1950-aj jaroj fari tiel imponan, internacian kaj efikan projekton uzante (ankaŭ) E-on! Kaj, eble pli pensige ol tio, kial nun, disponante la modernajn fulmrapidajn komunikilojn, ni ne faras tiajn projektojn! Mi forte esperas, ke la aperigo de tiu ĉi vere interesa artikolo instigos multajn samideanojn enpensiĝi pri planado kaj realigado de internaciaj projektoj utiligante nian lingvon.

Alia artikolo, kiu vere impresis min apartenas al Petro CHRDLE (paĝo 28), kiu tiel honeste kaj koncize rakontas pri siaj esperantista vivo kaj angoroj, kaj tio, ke kiel li finfine – kaj feliĉe – povis sukcese certigi ankaŭ la estontan pluvivon de la fruktoj de siaj longdaŭraj strebadoj. Mi kredas, ke la daŭripovecon de nia movado garantiis/as ja tiaj sindonemaj homoj, kiuj paralele kun sia ĉiutaga kaj profesia vivo, tutkore gravigis/as la pravajn kaj homecajn ideojn kaj idealojn de L.L. Zamenhof.

Kaj fine, mi elkore gratulas ĉiujn vin pro la alveno de la kristana kaj la ĉina novjaroj, esperante ke ili heroldos tutpacan eraon por la tuta homaro ekde nun posten! Certe post tiom da jarcentoj ekpost la homa civilizacio, estas neakceptebla kia ajn malpaco kaj milito tra la tuta terglobo.


Bonan legadon!

Ahmad Reza MAMDUHI

La Infanoj de la Mondo kaj ties redakta procezo

de SUNAGA Satoŝi (Japanio)

En ĉi tiu artikolo, mi ŝatus prezenti superrigardon de la japanaj sublernolibroj por infanoj nomataj *La Infanoj de la Mondo* (*Sekai-no-Kodomo*) kaj la redaktadan procezon por tiuj libroj. Ĉi tiu ekzemplo montras interesan eblon utiligi Esperanton por internacia eduka projekto.



Figuro 1: Fronta kovrilo, *La Infanoj de la Mondo*,Vol.15 Oceanio (Heibonsha;Tokio, Aprilo 1957)

La Infanoj de la Mondo estas 15 serioj da sublernolibroj por infanoj eldonitaj de la eldonejo Heibonsha inter 1955 kaj 1957 (*Tabelo 1*). La projekto celis profundigi la internacian komprenon de japanaj infanoj. La libroj enhavas eseojn verkitajn de infanoj el la tuta mondo, tradukitajn en la japanan por ke japanaj infanoj povu informiĝi pri la geografio kaj historio de la mondo. Ĉi tiuj inkluzivas ankaŭ klarigajn tekstojn, infanajn desegnaĵojn, diagramojn, grafikaĵojn kaj fotojn. Iuj volumoj, kiel la Francia volumo, estas dediĉita al unu lando, dum aliaj, kiel la Sudorienta Azia volumo, estas kunmetitaj laŭ regionoj. Ĉiu volumo enhavas ĉirkaŭ 200 ĝis 300 infanajn eseojn. Kvankam tiuj estas publikigitaj en la japana, la redaktadan procezon multe influis la Esperanto-movado en la 1930-aj ĝis 1950-aj jaroj. La antaŭparolo de la libro estas skribita en la japana, angla, franca kaj Esperanto. Jen kiel ekzemplo la Esperanta antaŭparolo de la oceania volumo (*Figuro 1*): „Tiu ĉi libro naskiĝis de la kunlaborado de infanoj kaj iliaj geinstruistoj de Aŭstralio, Nov-Zelando kaj aliaj insuloj. Ĝi estu interligilo por la paco kaj amikeco inter infanoj de tiuj landoj kaj Japanio.”


Tabelo1: Komponado de *La Infanoj de la Mondo*

Vol.	Dato de publikigo	Landoj/regionoj, kie estas kolektitaj infanaj eseoj
Vol.1 Ĝenerala Enkonduko	Sep 1957	
Vol.2 Japanio	Dec 1956	Japanio, Okinavo

Vol.3 Ĉinio kaj Koreio	Aŭg 1955	Ĉinio, Tajvano, Nord-Koreio, Sud-Koreio
Vol.4 Sudorienta Azio	Apr 1956	Indonezio, Filipinoj, Vjetnamio, Laoso, Kamboĝo, Tajlando, Malajzio kaj Singapuro, Pakistano, Birmo, Nepalo, Cejlono, Hindio
Vol.5 Okcidenta Azio kaj Afriko	Okt 1957	Irano, Irako, Turkio, Sirio, Israelo, Jordanio, Egiptio, Alĝerio, Maroko, Kanarioj, Madejro, Ganao, Niĝerio, Franca Ekvatora Afriko, Kameruno, Belga Kongo, Tanganjiko, Rodezio, Maŭricio, Madagaskaro, Mozambiko, Unio de Sudafriko
Vol.6 Sovetunio	Feb 1956	Rusa Soveta Federacia Socialisma Respubliko, Respubliko de Ukrainio, Respubliko de Kazaĥio, Respubliko de Belorusio, Respubliko de Azerbajĝano, Respubliko de Taĝikio
Vol.7 Orienta Eŭropo	Aŭg 1956	Pollando, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Rumanio, Bulgario, Albanio, Jugoslavio
Vol.8 Mezeŭropo	Okt 1955	Germana Demokratia Respubliko, Federacia Respubliko Germanio, Nederlando, Belgio, Svislando, Aŭstrio
Vol.9 Francio	Feb 1955	Francio
Vol.10 Unuiĝinta Reĝlando kaj Irlando	Jul 1955	Anglio, Kimrio, Skotlando, Nord-Irlando, Irlando
Vol.11 Suda Eŭropo	Feb 1957	Italio, San-Marino, Malto, Hispanio, Portugalio, Grekio
Vol.12 Norda Eŭropo	Dec 1955	Danio, Norvegio, Svedio, Islando, Finnlando
Vol.13 Norda Ameriko	Jun 1956	Kanado, Danio (Gronlando), Alasko, Usono, Havajo
Vol.14 Latin Ameriko	Jun 1957	Meksiko, Gvatemalo, Honduro, Salvadoro, Nikaragvo, Kubo, Haitio, Venezuelo, Kolombio, Peruo, Brazilo, Urugvajo, Argentino, Ĉilio, Bolivio, Paragvajo
Vol.15 Oceanio	Apr 1957	Aŭstralio, Nov-Zelando, Oceania Insulo

La redaktantoj de *La Infanoj de la Mondo* estis Akita Ujaku (kontrolisto), Ito Saburo (planisto) kaj la redakcio en la internacia komunikado-sekcio de Heibonsha: Kurisu Kei (Tsugu), Sakai Matsutaro kaj Nakagaki Kojiro. Ili ĉiuj estis esperantistoj el la 1930-aj jaroj. Precipe Kurisu Kei, en sia libro *La Sama Suno Lumigas la Mondon* (Kitaoojishobou; Kioto, Junio 1949), parolas pri sia amikeco kun la franca esperantisto Honoré Bourguignon kaj la

Internacia Asocio de Revoluciaj Esperantaj Verkistoj en la 1930-aj kaj 40-aj jaroj, kaj pri la literatura revuo *Infanoj sur Tutmondo*, kiun Bourguignon redaktis kaj publikigis (*Figuro 2*).



Figuro 2: Kurisu Tsugu (Kei), *La Sama Suno Lumigas La Mondon* (Kitaoojishobou; Kioto, Junio 1949)

Krome, la redaktado de tiuj libroj ankaŭ estis aranĝita de Kokubun Ichitaro kaj Narita Chukyu, kiuj estis engaĝitaj en la skribeduka movado, en kiu junaj instruistoj provis igi infanojn libere skribi pri siaj propraj vivoj. Ambaŭ movadoj estis subpremitaj dum la dua mondmilito. Tio signifas, ke homoj engaĝitaj en du kulturaj kaj instruaj movadoj, kiuj estis subpremitaj en la 1930-aj jaroj kaj 1940-aj jaroj, estis kolektitaj kune en Heibonsha en la 1950-aj jaroj.

La eldonprojekton oni efektivigis uzante la Esperanto-komunikan reton establitan antaŭ la milito por ke infanoj tra la mondo verku komponaĵojn en sia gepatra lingvo (plenkreskuloj kaj instruistoj kolektis la komponaĵojn), kompilante kaj tradukante la kolektitajn komponaĵojn. El la materialoj postlasitaj de Yoshida Kusuho, kiu estis la redaktestro ĉe Heibonsha, ni povas detale analizi kaj konsideri la redakcian procezon de *La Infanoj de la Mondo*.

1. Por kolekti infanajn eseojn en la mondo, la redakcio en Heibonsha skribis multajn leterojn en la angla, Esperanto kaj la loka lingvo kaj sendis ilin al registaraj instancoj, Esperanto-Ligoj aŭ unuopaj esperantistoj, petante ilin plusendi la peton pri eseoj al siaj lokaj lernejoj kaj instruistoj.

2. La redakcio sendis pli detalan peton al tiuj, kiuj respondis. En ĉi tiu kazo, la traduko de japanaj infanaj eseoj estis almetita kiel ekzemplo de la speco de eseo, kiun ili serĉis, same kiel internacia informilo priskribanta la enhavon kaj redakcian politikon de la serio.

3. La eseoj verkitaj en la loka lingvo de infanoj estis tradukitaj en la japanan.


4. La tradukita teksto estis „reskribita" por faciligi la legadon de japanaj infanoj.

5. La libro estis eldonita en sia fina formo, kun la teksto aranĝita kaj ilustrita.

La procezo de kolektado de la eseoj estis influita de la internacia situacio dum la „malvarma milito". Ekzemple, la ĉeffontoj montras, ke la sukceso aŭ malsukceso de Esperanta korespondado multe variis depende de la regiona politiko kaj de la socia sistemo. Esperanto-vojo ne estis uzata en Ĉinio, Tajvano kaj la Korea Duoninsulo (*Figuro 3*). Tie la kontaktoj estis petitaj nur per ŝtataj institucioj.

Ankaŭ la enhavo de la eseoj estis stampita per plurtavola historio. Ekzistis kvar tipoj de infanaj eseoj kiel ĉeffonta materialo: originalaj, tradukitaj, reverkitaj kaj kompletigitaj versioj. Oni opinias, ke la redakcio esence provis esti fidela al la originalaj eseoj, sed la tradukaj, reverkitaj kaj redaktaj procezoj rezultigis subtilajn ŝanĝojn de la originalo. Precipe supozeblas, ke la enhavo rilata al la dua mondmilito, kolonia regado kaj sendependecaj militoj reflektis la internaciajn situacion kaj valorojn en Japanio tiutempe en la 1950-aj jaroj.

Kvankam ni nur ĵus komencis analizi *La Infanoj de la Mondo* kaj ĝiajn ĉefajn fontojn, mi kredas, ke ĝi estis unika eksperimento kaj restas grava fonto por kompreni la historian kuntekston en la 1950-aj jaroj.



Figuro 3: Redakciaj materialoj; La Rolo de Esperanto en la dek kvin volumoj (Februaro 1956).

Procento de vojoj por kolekti eseojn:

Maldekstre (asteriskoj): kolektado de infanaj eseoj per Esperanto

Centre (oblikvoj): per ŝtataj institucioj

Dekstre (punktoj): aliaj kontaktvojoj

De supre (No. de Publikiga ordono / Landoj): No.1 Francio, No.2 Grandbritio, Irlando, No.3 Ĉinio, Tajvano, Nord-Koreio, Sud-Koreio, No.4 FRG k.a., Svislando, GDR, No.5 Nordeŭropo, No.6 USSR, No.7 Sudorientazio, No.8 Usono, Kanado, No.9 Orienteŭropo

Terminologio de supera instruado/edukado

de Ilona KOUTNY, emerita profesoro de AMU,
gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj 1998-2024, Ikoutny@amu.edu.pl

Enkonduke

En multaj terenoj, manke de ekzisto de funkcianta sistemo en Esperantio, la terminoj ne fiksiĝis, estas diferencoj en la uzo laŭ la landoj kaj uzantoj. Ofte temas pri la plej bazaj aferoj en etnaj lingvoj, ekzemple kaze de la instrusistemo. Malgraŭ la malsameco de lernejaj sistemoj necesus trovi komunan denominatoron, uzi pli larĝajn, abstraktajn vortojn por loki la konkretajn bazajn nociojn.

Universitata instruado en Esperanto okazas malofte, tamen estas ekzemploj, kiuj donas iun bazon por la kutima uzo de terminoj de supera instruado. En la Universitato Eötvös Loránd (ELTE) en Budapeŝto funkciis Esperanto-fako dum pli ol 40 jaroj (1966-2008), mi tie studis kaj ankaŭ instruis dum 10 jaroj. En la Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznano funkciis postdiploma interlingvistika fako dum 26 jaroj (1998-2024) kaj unufoje, dum la lastaj du studjaroj (2022-24) ankaŭ taga magistra programo pri interlingvistiko, ambaŭ en Esperanto (la dua en kombino kun la angla). Ankaŭ AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj, San Marino) ellaboris sian modelon, kies terminoj troviĝis en ĝiaj regularoj.

Okupiĝante jam delonge pri leksikografio (vd. *Hungara-Esperanta meza vortaro*, red. kun István Szerdahelyi, komenco en 1983, apero nur en 1996; Koutny et al. 2000: *Hungara-Pola temvortaro*), mi komencis verki trilingvajn temvortarojn antaŭ 25 jaroj, kiuj fontis el mia instrulaboro kaj servis al ĝi. La Esperantajn temvortaretojn mi aperigis po 2 temoj. Nun mi mencias nur la temvortaron gravan por la nuna temo: *Angla-Esperanta-Hungara etvortaro pri Lernado kaj Laboro* (2002, Poznań: ProDruk), kiu – krom miaj spertoj – baziĝis ankaŭ sur retaj serĉadoj kaj konsultiĝo kun kolegoj internacie pri kelkaj tiklaj vortoj, esprimoj.

Mia vortara projekto **SET** (Strukturita Esperanta Temvortaro) revigliĝis en 2023, ĉar serĉante temon por diplomlaboraĵo, 4 gestudentoj decidis labori pri iu ĉapitro. La ĉinan version de la ĉapitro pri lernado de la *Angla-Esperanta-Ĉina etvortaro pri Lernado kaj Laboro* (2024. Poznań: Interlingvistikaj Studoj & Rys) ellaboris YU Jianchao el la postdiploma grupo. Tiel la leksiko

de lernado estis reviziata. Mi prezentos nun nur kelkajn – ĉefe problemajn – terminojn el la supera instruado, ja en tio mi havas preskaŭ 40-jaran sperton, praktike en du landoj kaj konojn pri kelkaj aliaj landoj. La terminoj estas ankoraŭ diskuteblaj. Ni devas trovi la plej taŭgajn formojn, uzeblajn en diversaj kuntekstoj, ja la projekto daŭras nun per la ellaboro de la ĉeĥa versio kaj la enretigo de ĉiuj lingvaj versioj kaj temoj. Necesas ordigo ankaŭ pro tio, ĉar ofte aŭdeblas erara uzo kiel **mi havas magistron* anstataŭ *magistran titolon* aŭ la ĝenerala uzo de *profesoro* por mezlerneja kaj superalerneja instruisto.

Por la nunaj terminoj mi iom serĉis ankaŭ en la tekstaro de *Corpuseye* (https://corp.visl.dk/), kiu entenas pli multe da ĉiutagaj tekstoj ol *tekstaro.com* kaj en Vikipedio. Pri la diferenco inter altlernejo, kolegio kaj universitato mi demandis ankaŭ la artefaritan intelekton ChatGPT.

Lernejotipoj

Unue ni dividu la institucian instruadon en 3 grupojn: *baza / meza / supera instruado, edukado* (A: primary / secondary / tertiary, higher education) kun la lernejoj: *bazaj, mez- kaj superaj lernejoj* (A: primary, elementary / secondary, comprehensive school / institution of higher education/learning, college). La **bazlernejo aŭ elementa lernejo** estas la unua lernejo, kiun la infanoj – ekde la aĝo de 6-7 jaroj – devige frekventas, kie komenciĝas la instruado de skribado, legado, kalkulado. La fino ne estas tiom evidenta, kaj tiel ankaŭ la komenco de la **mezlernejo** ne estas fiksa, ĝi povas komenciĝi post 4, 6 aŭ 8 elementaj klasoj. Ekzistas en tiu ĉi dua nivelo gimnazioj, liceoj, fakaj mezlernejoj. Kutime estas iu fina ekzameno kiel la abiturienta ekzameno en la aĝo de 17-19 jaroj.

La tria ŝtupo, la **supera lernejo** denove estas pli klara, sed ĝia strukturo denove varias. Ekde la enkonduko de la bolonja sistemo en Eŭropo, kutime funkcias la unua nivelo: *bakalaŭraj studoj* (A: bachelor studies) kaj la dua nivelo: *magistraj studoj* (A: master studies), al kiuj aldoniĝas la *doktoraj studoj* (doctoral studies). En iuj lernejoj okazas ankaŭ postdiplomaj studoj; ili ne donas aldonan diplomon, nur atestilon kun kvalifiko.

Universitato kutime proponas ĉiujn 3 ŝtupojn en plej diversaj terenoj de filologio tra natursciencoj ĝis medicino, samtempe ĝi ebligas sciencan esploradon. Do ekzistas:

Agrikultura, arta, ekonomika, ĝenerala, jura, medicina, pedagogia, teknika ktp. universitatoj.

Ekzistas ankaŭ t.n. *malfermitaj universitatoj* (A: open university), kie eblas studi iujn sciencajn terenojn sen devigo, kaj por maljunuloj t.n. *universitatoj de la tria aĝo* (A: university of third age).

Ankaŭ la termino **altlernejo** estas uzata por tiuj superaj lernejoj, kiuj proponas plej ofte nur la unuan nivelon kaj en iuj konkretaj terenoj kiel komerco, tekniko. Iuj nomiĝas *kolegio* laŭ la angla kaj franca nomo. **Kolegio** estas ambigua termino ankaŭ en la angla kaj franca, ja ĝi estas tie uzata ankaŭ por la supera parto de la mezlernejo aŭ kiel liceo. Aldoniĝas ankaŭ la uzo kiel supera organo ĉefe religia (elekta, pastra konsilio). Zamenhof uzis „kolegio" nur en tiu senco laŭ la retrovoj en *tekstaro.com*. Pli konvenas en Esperanto paroli pri la kategorio, al kiu ĝi apartenas: mezlernejo aŭ altlernejo por eviti miskomprenon.

Superan lernejon gvidas **rektoro** aŭ prezidanto (A: president, chancellor, rector), kiu havas plurajn anstataŭantojn: vicrektorojn aŭ vicprezidantojn.

Universitatoj kaj ĝenerale superaj lernejoj havas organizajn unuojn laŭ la sciencaj terenoj: **fakultato** (A: faculty), krome pli malgrandajn kiel **instituto** kaj **katedro** (A: departement, chair). Lingvoj studeblas en filologia fakultato, biologio en la naturscienca fakultato, sociologio en la sociscienca fakultato. Estontaj dentistoj studas en la dentista fakultato de la medicina universitato, estontaj elektroinĝenieroj en la elektroinĝeniera fakultato de la teknika universitato. La fakultaton gvidas **dekano** (A: dean) kun siaj vicdekanoj, la instituton la **direktoro de la instituto** kun siaj vicdirektoroj.

Diversaj universitatoj havas diversajn regulojn por la konsisto de tiuj ĉi unuoj. Ekz. en Pollando katedron povas krei titola profesoro kun aliaj 9 kolegoj, el kiuj minimume du estas doktoroj, li iĝas **katedrestro**. En aliaj landoj kiel Nederlando sufiĉas unu profesoro por krei katedron se li/ŝi okupiĝas pri iu speciala tereno.

Agado en universitato

En la universitato okazas **kursoj** (A: courses), kiuj organiziĝas laŭ **semestroj** aŭ trimestroj. Ili povas esti **prelegoj** (A: lectures), kadre de kiuj la preleganto prezentas la materialon, aŭ seminarioj, ekzercoj, laboratoriaj praktikoj, kie la partoprenantoj havas sian rolon dum la lecionoj. Por studi iun **fakon** (A:

program, studies), studentoj devas plenumi kelkajn devigajn kursojn kaj ofte kelkajn devige elekteblajn kursojn. Ekzistas ankaŭ liberaj kursoj. Por kelkaj fakoj necesas ankaŭ praktiko / staĝo, ekz. por estonta instruisto staĝo en lernejo. Eblas paroli pri angla, germana kaj interlingvistika fakoj, pri matematika kaj fizika fakoj, kies **studprogramo** (A: curriculum) entenas la devigajn kaj elekteblajn studobjektojn (kursojn). Ofte eblas ankaŭ specialiĝoj (A: specialities). La konkretan studadon determinas la studhoraro (A: time table, schedule).

Kutima studado okazas surloke en la lernejo, sed ekzistas ankaŭ **distanca/ekstera/reta studado** (A: distant, on-line studies) kun specialaj renkontiĝoj, ekz. semajnfinaj **sesioj**. Kadre de la interlingvistika postdiploma fako en AMU ni havis unusemajnajn sesiojn en septembro surloke. Lernolibroj kaj retaj platformoj helpas la studentojn.

Testoj, eseoj, projektoj, parolaj kaj skribaj ekzamenoj servas al la **taksado** de la studentoj. Ĉe popularaj fakoj povas okazi akcepta ekzameno antaŭ ol komenci la studojn. Studentoj ekzameniĝas aŭ trapasas kelkajn ekzamenojn dum siaj studoj, la instruistoj ekzamenas ilin. Se iu malsukcesas, fiaskas, li aŭ ŝi povas ripeti la ekzamenon. La notoj estas diversaj, ie la 5 estas la plej bona, alie la 1. La averaĝo de notoj estas grava por ricevi stipendion (A: scholarship).

Fine de la studoj eblas ricevi **atestilon** aŭ **diplomon** post pretigo de diplomlaboraĵo/finlaboraĵo/faklaboraĵo/magistra laboraĵo (A: master's thesis). Por doktoriĝo necesas verki detalan disertacion (A: dissertation). Magistran kaj doktoran laboraĵojn sekvas defendo de la tezoj.

Titoloj

Bakalaŭro, magistro kaj *doktoro* (A: bachelor, master, doctor) estas homoj, kiuj ricevis **bakalaŭran, magistran**, resp. **doktoran titolon**. En iuj landoj ekzistas ankaŭ duagrada doktoriĝo, t.e. ***habilitiĝo***. Tiam temas pri habilitiĝinta doktoro. Povas ekzisti 5a ŝtupo (kiel en Pollando kaj Hungario) **profesoriĝo** – akirebla post signifa scienca laboro (esploro, artikoloj, libroj). **Akademiano** konsideriĝas kiel la plej alta nivelo. Elstaraj personoj ricevas la titolon de honora doktoro (A: doctor honoris causa). Post fino de universitata kariero iuj iĝas profesoroj emeritaj.

Paralele estas **universitataj postenoj**, akireblaj post akiro de certaj sciencaj titoloj kaj scienca laboro, eldonaĵoj. Kun magistra titolo iu povas labori kiel

universitata instruisto, ofte kiel asistanto (A: lecturer). Post la akiro de doktora titolo eblas iĝi adjunkto/lekciisto (A: *BR* senior lecturer, *US* assistant professor). Post habilitiĝo, se tio ekzistas, cetere post sciencaj atingoj sekvas la posteno de docento/asocia profesoro (A: *BR* reader, *US* associated professor). Post profesoriĝo iu povas esti nomumita plena profesoro (A: full professor).

Internacia Konferenco de la NRO-oj en oficiala partnereco kun UNESKO (16-19.12.2024)

de Renée TRIOLLE (Francio)

Kvankam ILEI ne estas NeRegistara Organizo en rilatoj kun UNESKO, ĝi rajtis sendi delegitojn al la Internacia Konferenco de la NRO-oj en oficiala partnereco kun UNESKO. (Mi memorigas vin, ke ILEI perdis sian statuson, ĉar ĝi ne respondis la demandarojn. Daŭre evidentiĝas, ke pli gravas tio, kion oni raportas ol tio, kion oni faras!) El la 450 NRO-oj, tri centoj sendis reprezentantojn kaj klare evidentiĝis, ke NRO-oj, kiuj delonge vizitas la institucion UNESKO, bone konas la sistemon kaj intervenas, dum la novuloj estas „perditaj".



Esperanto estis reprezentata de UEA, ILEI kaj TEJO. Dum tri tagoj, de la 16-a ĝis la 19-a de decembro 2024, ni aŭskultis belajn raportojn de oficialuloj

de UNESKO pri tio, kion faras UNESKO. Plurfoje ni aŭdis, ke ni laboras surloke, do bone konas la terenajn cirkonstancojn, eĉ se pluraj NRO-oj bedaŭris, ke UNESKO prifajfis ilian laboron kaj ne kontaktis ilin pri temoj, pri kiuj ili laboras de jaroj.

Rilate edukadon, ĝi estu dum la tuta vivo. Novaĵo estas, ke ankaŭ la gepatroj ludu gravan rolon. Edukado estu inkluziva („ne forgesu la knabinojn, ne forgesu la handikapitojn"). Ĝi estu VERDA, tio signifas, ke ĝi lasu lokon al ekologio kaj pli koncentriĝu ĉe la celoj de daŭripova evoluado (programo ĝis 2030). Dum ateliero pri „Edukado al paco" mi rajtis interveni: mi memorigis, ke ekde sia naskiĝo, Esperanto estas lingvo de paco, kreita de juna humanisto, kiu opinias, ke se homoj el diversaj lingvoj kaj religioj interparolus antaŭ ol interbatali, ili vivus pli pace. De tiam, Esperanto efektiviĝis brila lanĉilo por eklerno de fremdaj lingvoj kaj interkulturilo. Dum UNESKO „oficiale" defendas multlingvecon, uziĝas ĉefe la angla kaj la franca. En sia financa raporto, la Ligkomitato konstatas, ke la kresko de elspezoj de Forumoj ŝuldiĝas al la samtempa tradukado: en Parizo, la podianoj kaj panelistoj ĉefe parolis angle, dum la reprezentantoj de NRO-oj plejparte parolis france... Nova Ligkomitato estis elektita, la prezidantino estas moldava.

Plurpaĝa rezolucio estis akceptita: edukado estu inkluziva (ne forgesu knabinojn, handikapitojn, malriĉegulojn), ĝi agnosku la surlokajn indiĝenajn sciojn kaj kompetentecojn, oni fortigu la rilatojn inter la NRO-oj, daŭre prioritatas Afriko kaj junularo, atentu kaj promociu la novajn teknologiojn, kiuj bone aŭ mise uziĝas kaj ni atentu la celojn de la daŭripova evoluo ĝis 2030. Se mi reaŭdis tion, kion mi jam plurfoje aŭskultis, mi konstatis, ke Esperanto estas bone konata kaj prikonsiderata de (malnovaj) NRO-oj, sed tute ne de la novaj. Ni provis informi kaj esplori pri komuna agado kun NRO-oj (ekz. Montessori).

Esperanto en miaj okuloj

Liu Miao xue (Neĝo)

Mi estas studentino de Esperanto ĉe Zaozhuang-a Universitato. Kaj mi ŝatus paroli al vi pri la internacia lingvo el mia vidpunkto.

Mi unue eksciis pri la ekzisto de Esperanto kiam mi elektis universitaton. Inter la multaj eblaj fakoj, tiu speciala lingvo aparte kaptis mian atenton. Mi elektis ĝin ĉefe pro scivolemo, kiu vekis tamen kontraŭstarojn de multaj

homoj ĉirkaŭ mi. La plejmulto pensis, ke Esperanto ne helpos min por mia estonta evoluo, kio estas kerna zorgo en la nuna Ĉinio. Nur mia patrino subtenis mian elekton.



Filma ekrankopio de nia partopreno en la Esperanta Muzika Festivalo

Enirinte Zaozhuang-an Universitaton, kiu unike proponas tiun kvar-jaran bakalaŭran fakon, mi eklernis Esperanton kaj komencis iom kompreni pri la lingvo kaj ĝia kulturo. Laŭ mi, Esperanto estas lingvo de paco, egaleco kaj toleremo. Pro ĝia kreado mi opinias, ke ĝi estas la plej granda lingvo en la mondo. Ĝi ebligas al homoj el diversaj nacioj komuniki kaj interkompreniĝi sen miskomprenoj kaŭzitaj de la ekzistantaj lingvaj baroj. Samtempe, ĝi donas al mi ŝancon konkrete aktivi, kion mi vere ĝuas. Kiel novaj fortoj en Esperantujo, miaj samklasanoj kaj mi aktive partoprenas en diversaj agadoj, kiel ekzemple la Esperanta Muzika Festivalo aŭ la 10-a Datreveno de la Esperanto-Muzeo de Zaozhuang-a Universitato. Ankoraŭ viglas en mia menso nia mojosa ekzercado por pretigi la programon de la Esperanta Muzika Festivalo. Kaj precipe neforgesebla estas la vizito de la Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, Duncan Charters, por kune festi la Jubileon de la Esperanto-Muzeo. La vortoj, kiujn mi povis interŝanĝi kun li kaj lia edzino Cecily Lee en tiu okazo, ankoraŭ sonas en miaj oreloj kaj multe kuraĝigas min en mia lingvo-lernado. Sendube ĉi tiuj agadoj kaj ŝancoj de

interkultura komunikado profitigis min multe kaj grande vastigis miajn horizontojn.

Sed, malgraŭ tiuj riĉigaj spertoj, ni ne povas ignori, ke la ideala stato, al kiu aspiras Esperanto, estas malfacile atingebla en tiu ĉi stadio de la monda historio, kiam mankas konscio pri la graveco de egalrajtaj intergentaj rilatoj. Do, la estonta evoluo de tiuj el ni, kiuj studas Esperanton kiel fakon ĉe Zaozhuang-a Universitato, estas ankoraŭ tute ne certa. Eble la plejmulto el ni elektos sekvajn studobjektojn kaj fine postenojn, kiuj havos neniun rektan rilaton kun Esperanto, kaj tiel vole nevole malproksimiĝos de ĝi, pro okupiteco en siaj novaj laboroj. Mi mem pensas, ke mi plu studos estonte, sed eble Ĉinan Historion. Mi ŝatus iĝi instruistino pri tiu fako, instruante historiajn sciojn kaj samtempe disvastigante Esperanton, por ke pli da homoj povu koni kaj kompreni ĝin. Fakte, mia lernado en Zaozhuang kaj la vastaj kolektoj de la Esperanto-Muzeo montris al mi la gravecon de nia lingvo por la starigo de la nuntempa Ĉinio, ĉar ĝiaj idealoj allogis kaj inspiris tiom multe da elstaraj kleruloj kaj sindonaj aktivuloj. Mia revo estus fine iĝi lernejestrino, kio donus al mi eĉ pli da ŝancoj konigi la internacian lingvon al pli da lernantoj. Kiu ajn estos mia sekva vojo, mi pensas, ke la ideoj pri egaleco kaj toleremo alportitaj al mi de Esperanto neniam malaperos kaj mi profitos de ili dum mia tuta vivo.

Tra miaj spertoj...

Brila leciono pri pedagogio

de Mireille GROSJEAN (Svislando)

En la jaro 1979 aperis filmo titolita *De Mao al Mozart*. Temas pri raporto pri trisemajna vizito de la violonisto Isaak STERN (mondfama usona artisto) en Ĉinio. Mi spektis la filmon iom poste kaj estis tre tre impresita. Antaŭ kelkaj tagoj amiko trovis por mi la ligilon en Youtube kaj mi povis spekti la filmon denove: *From Mao to Mozart, Issac Stern in China, Full Documentary* https://www.youtube.com/watch?v=SlDJ2aE7iGs.

La filmo montras diversajn koncertojn donitajn de la fama usona violonisto, plurajn lecionojn, kiujn li donis al ĉinaj infanoj, kaj kelkajn pejzaĝojn kaj urbojn ĉinajn en tiu jaro 1979. Aŭdiĝas raportoj de ĉinoj, kiuj suferis dum la kultura revolucio. Pro tio la filmo estas tre interesa.

Kial venis al mi la ideo paroli al vi pri tiu filmo? La personeco de la artisto kaj lia maniero alparoli la geknabojn per la helpo de interpretistino kompreneble estas substrekindaj. Isaak Stern kompetentas pri muziko, amas, amegas muzikon, kaj volas transdoni tiun senton al ĉiuj ĉirkaŭ si. Ni rigardu, kiel li sukcesas transdoni tiun amon al muziko kaj sukcesas komprenigi al la ĉinaj infanoj, kiel plialtigi la ludkapablojn kaj plibonigi la esprimpovon dum ludado. Li estas pedagogo kaj instruas muzikon; ni estas pedagogoj kaj instruas lingvon. Muziko kaj lingvo estas komunikiloj. Do simileco povas aperi.

En la filmo ni malkovras ĉinajn infanojn, kiuj estis elektitaj por studi muzikon plentempe kaj kiuj dediĉas ĉiujn siajn fortojn al progreso en ludado. Kelkaj ludas violonon, aliaj ludas aliajn instrumentojn. Ne gravas. Ili ĉefe celas la kapablojn ludi rapide kaj ludi malfacilajn pecojn. En niaj kursoj pri Eo kelkaj studentoj brilas en klarigoj pri li – ŝi – ili - si, sed ne kapablas konvinki iun per trafaj dirajoj. Ĉu vi vidas la similecon? Do la klopodoj de Stern iras al esprimo de emocioj; „Ludu el via koro, ne el via violono!" „Kreu muzikon per via violono kaj ne koncentriĝu ĉe via instrumento!" Li ĉiam alparolas la ludanton, neniam la interpretiston. Tiel la infano ricevas la mesaĝon rekte, pro la fakto, ke Stern havas esprimriĉajn vizaĝon kaj korpon. Li teatrumas. Liaj okuloj povas esti ronde grande malfermitaj aŭ ne, la tuta vizaĝo moviĝas laŭ la transdonenda mesaĝo. La tuta korpo skizas la melodiajn movojn. Movo de arĉo ne devas esti rigida tiro, sed devas havi elanon, tion li montras eĉ iom troe, sed pro la diferenco de lingvo lia farmaniero bezonatas; ĝi estas tre efika kaj oni povas observi la evoluon de la ludado ĉe tiuj ĉinaj junaj muzikistoj.

Li fine ĉiam gratulas ilin vigle kaj komuna rido eksplodas. La kursoj okazas en plenplena salono, kie la publiko ege silente sekvas la lecionojn kaj ege brue aplaŭdas. La mesaĝo de Stern atingas la homojn, la korojn de la homoj. Tia ankaŭ devas esti nia instruado.

Kiam mi instruis, mi memoras, ke mi ofte akompanis miajn dirojn per gestoj por helpi al kompreno. Kun la frazo „la infano grimpas sur la arbon" mi per manoj mimis grimpadon. Kun la frazo „La viro parolas tro mallaŭte" mi metis mian manon ĉe mia orelo kiel maljunulo. En la momento, kiam en testo mi devis paroli kaj la lernantoj devis aŭskulti kaj skribe pruvi sian komprenon, tiam mi devis teni miajn manojn malantaŭ mia dorso por NE helpi ilin per gestoj. Instruisto ne havu manojn en poŝoj dum parolado, en Azio tio estas maldeca. En Ameriko tio estas ofta. Interkulturaj malsimilecoj….

El la landoj kaj sekcioj

Albanio

Enkadre de Zamenhof-Tago

Esperanto ĉe gestudentoj de Medicinista Universitato en Tirano

Laŭ la invito de profesorino pri sociologio, Entela Binjaku, mi parolis pri la Esperanto-tago antaŭ ĉirkaŭ 100 gestudentoj de la Ŝtata Medicinista Universitato de Tirano, la 10-an de decembro 2024.

Fraŭlino Binjaku, komence, sciigis al la gestudentoj, ke jam ekzistas ankaŭ en Albanio esperantista asocio kaj la 15-an de decembro oni celebras la naskiĝtagan datrevenon de la kreinto de Esperanto, la okulkuracisto Ludoviko Zamenhof. Ĉi-lasta, interalie, kuracis senpage unu tagon semajne la malriĉajn malsanulojn. Esperanto mem estis proklamita ne nur kiel internacia neŭtrala komunikilo, sed ankaŭ kiel interpaciga lingvo de la diversaj etnoj.

Mi eksplikis mallonge la strukturon de IL, ĝiajn avantaĝojn pro la relativa facileco kaj propedeŭtika valoro. La gestudentoj demandis kial ĝi ne estas disvastigita kaj akceptita vaste mondskale ĝis nun. Mi substrekis du ĉefajn kialojn: politikajn kaj psikologiajn. Mi rakontis ankaŭ pri la klopodoj de la iama Ligo de Nacioj en Ĝenevo en la jaro 1922 por enkonduki Esperanton en la elementajn lernejojn, laŭ la propono de grupo de membroŝtatoj, inkluzive Albanion. Bedaŭrinde la franca delegito vetois pensante, ke la franca plu dominos en la internaciaj komunikadoj. Same agis poste aliaj superpotencoj, kiuj, per sia lingvo, kondukas ankaŭ sian kulturon. Granda obstaklo estas ankaŭ tiuj psikologiaj, timo kaj hezito antaŭ novaj revoluciaj ideoj, nekono de la lingvo mem, privilegia pozicio en la socio de homoj posedantaj la anglan lingvon k.a..

La konversacio longis unu horon.

Bardhyl SELIMI, albana ILEI-sekciestro

Brazilo

Agado de ILEI-BR 2024 kaj planoj por 2025

Dum la jaro 2024 la ĉefa agado de ILEI-BR estis la kunorganizado de la 57-a ILEI-kongreso. Raportoj jam aperis en la gazetoj *IPR*, *Esperanto* kaj *La ondo de Esperanto*. En tiu sama jaro mi, sekciestro en Brazilo ekde 2018, prenis ankaŭ la torĉon de nia loka asocio kaj iĝis ĝia prezidanto (jam je la tria fojo). Nun, profite al mia libertempo matene kaj posttagmeze, ĉar nun mi instruas nur vespere, mi iniciatis la de longe deziratan agadon, nome, montri

Esperanton al gelernantoj kaj geinstruistoj de publikaj lernejoj en mia urbo unue kaj poste en najbaraj urboj.
Pro tio mi jam akiris la retadresojn de ŝtataj kaj municipaj lernejoj el la tuta ŝtato Alagoaso kaj ankaŭ de edukaj kaj kulturaj sekretariejoj tra Brazilo.
Pasintjare, okaze de la 70-jara jubileo de la Rezoluzio de Unesko, al 27 ŝtataj sekretariejoj pri edukado kaj 27 ŝtataj sekretariejoj pri kulturo mi sendis la artikolon de UEA (tradukita al la portugala kun ligiloj al la retejoj de UEA kaj ILEI en la angla), kiel unua paŝo por montri la daŭran ekziston de la internacia lingvo. Bedaŭrinde el la 54 nur du reagis kaj dankis pro la artikolo. Ne gravas, kiel diris Zamenhof en *La Vojo*: „Ni semas kaj semas, neniam laciĝas… cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, ni semas kaj semas konstante.”[1]



La planoj por ĉi tiu jaro, 2025, estas:
Unue - proponi al lernejoj publikaj kaj privataj de mia urbo kaj eble ankaŭ de najbaraj urboj alagoasaj, prelegon (preparatan) pri „La Monda Lingva Problemo kaj la solvo pere de Esperanto”.
Due - donaci librojn al bibliotekoj de publikaj lernejoj (ago jam komenciĝinta en decembro 2024 en la lernejo, kie mi instruas).
Trie - proponi Esperanto-kursojn kaj ĉeestajn kaj virtualajn al la tuta komunumo precipe al gelernantoj de elementaj kaj mezaj lernejoj. La municipa eduka sekretariejo starigas kursojn senpage pri la angla kaj la hispana lingvoj por la komunumo, en tri lernejoj de nia urbo. Mi kontaktos ilin por enkonduki Esperanton en almanaŭ unu el tiuj lernejoj. Krom tio, mi daŭre instigos niajn brazilajn kursgvidantojn fariĝi membroj de ILEI (aŭ remembriĝi), aboni la revuon *Juna Amiko* kaj partopreni en la hibrida ILEI-kongreso.

[1] Jen la ligilo al la sendita teksto (fine de la mesaĝo mi aldonis la portugallingvan retejon de ILEI-BR): https://docs.google.com/document/d/1VhIEG3p-cDE6Zc8pnrlmwhYnIbG2yXbLlyvjTRdoz7k/edit?usp=sharing.

Jen la teksto de la informo pri la agado donaci librojn al bibliotekoj de publikaj lernejoj en la retejo de ILEI-BR (https://sites.google.com/view/ilei-brazilo): „Kadre de la ideo disvastigi Esperanton en lernejoj, fine de 2024, la brazila sekcio de ILEI donacis kelkajn librojn al la biblioteko de la „Municipa Lernejo Jaime de Altavilla", Santa Lúcia, Maceió, Alagoas.
Nia celo estas donaci Esperantajn librojn (gramatikojn, vortarojn kaj aliajn) al bibliotekoj de publikaj lernejoj. Se vi laboras en publikaj lernejoj en Maceió kaj volas havi Esperantajn librojn en via biblioteko, kontaktu min per Vacapo 82 99986-5126 aŭ retpoŝte: esperantomaceio@gmail.com.
Studentoj finintaj la elementan lernejon vespere, same kiel instruistoj, kunordigantoj kaj direktoroj, ricevis globkrajonojn kun la adreso de la retejo de ILEI-BR sur ĝi."
Mi esperas, ke tiuj agadoj kaj planoj povos veki ideojn similajn aŭ ne, en aliaj sekciestroj, kaj mi deziras esperplenan 2025 al ĉiuj esperantistoj.

Aristóphio A. ALVES FILHO

Burundo

Esp-seminario organizita de la klubo Paca Armeo de Bujumbura

La seminario okazis de la 20-a ĝis la 22-a de decembro 2024 en la Esperanto-centro en Rumonge. Partoprenis en ĝi esperantistoj el Buĵumburo, Rumonge kaj Nyanza-Lac. La seminario estis speciala, ĉar la Burundaj seminarianoj mem financis la seminarion ekde la komenco ĝis la fino. Agadoj de la evento:

1. Elekto de Fraŭlino Esperanto kaj ŝiaj kunuloj:

Sabaton, la 21-an de decembro, en bonaj klimato kaj etoso, la seminarianoj procedis al la elekto de Fraŭlino Esperanto en Burundo, kiu povos reprezenti Esperanton en naciaj kaj internaciaj kulturaj aranĝoj. Inter la 6 kandidatoj, kiuj batalis por porti la Esperanto-kronon, nur unu knabino nomata *MacLean Iradukunda* estis elektita kiel Fraŭlino E-o en Burundo. La unua dualokulo estis *Kevine Kwizera* kaj la Fraŭlino Popularеco *Umutoniwase Laila.*

2**. Ekzameno de Esperanto por Komencantoj**

La granda plimulto de la partoprenantoj en la seminario estis komencantoj, ili faris ekzamenon, ĉar ili delonge studis kaj atendis nur ekzamenon. Ĉiuj ricevis atestilojn. Venontjare, ili komencos la kurson por progresantoj.

3. Ekskursoj

Dum la seminario, la seminarianoj vizitis diversajn lokojn, nome: la termofontan akvon de Mugara kaj Mawimbi. Ili estis feliĉaj partopreni en la ekskurso.



4. Tradiciaj dancoj

Dum la seminario, la Burundaj tradiciaj dancoj estis dancitaj por honori la eventon. La seminarianoj montris siajn talentojn.

La seminario estis fermita en favora klimato kun vizito al la lago Tanganjiko. Mi elkore dankas al la burundaj seminarianoj, kiuj mem financis la seminarion. Mi esperas, ke aliaj sekvos la paŝon faritan de ili.

Aimé-Patrick MANIRAKIZA

***

Kurso por indiĝenaj instruistoj en Burundo

La indiĝena popolo en Burundo nomiĝas *twa*. Temas pri pigmeoj. En Burundo ekzistas diversaj sociaj tavoloj kun la nomoj *tutsi, hutu, twa*, kiuj apartenas al la sama etno, ĉar ili vivas sur la sama tereno kaj parolas la saman lingvon. La membroj de la *twa*-komunumo estas ofte diskriminaciataj, la infanoj ofte ne frekventas lernejon kaj se ili ricevas iom da eduko, ofte ili forlasas la lernejon sen fini la tutan bazan programon. Nuntempe ili ne plu povas vivteni sin per potfarado, ĉar neniu plu aĉetas iliajn potojn.



Okazis kontakto inter la membroj de ANEB (*Association Nationale pour l'Espéranto au Burundi – Nacia Asocio por Esperanto en Burundo*) kaj la *twa*-ministrino, Sinjorino Sabushimike [*vd. surfote*]. Ŝi estas ministrino pri solidareco kaj homaj rajtoj. Ŝi montris intereson pri Esperanto. En Ĝenevo ĉe Unuiĝintaj Nacioj (UN) en julio 2024 mi renkontis ŝin kaj ni parolis kune pri … Esperanto! Tuj poste ANEB-anoj denove estis en kontakto kun ŝi kaj ŝi proponis Esperanto-kurson en la urbo Nyabihanga de la provinco Mwambo.

La Girimbabazi Tujane-lernejo estas konstruita en vilaĝo nomata Kibungere, kie la ministro pri homaj rajtoj kaj solidareco kaj princo Kamatari estis naskitaj. La Nyabihanga komunumo, en kiu la lernejo situas, estas historia komunumo, ĉar ĝi estis la naskiĝloko de la unua demokratie elektita prezidanto, Mielchior Ndandaye, kiu estis murdita en 1993.
La plej multaj el la loĝantoj de la Kibungere-vilaĝo estas indiĝenaj. Ili vivtenas sin per fabrikado de potoj.

La ministrino donis klasoĉambron por la kurso kaj organizis protekton de la grupo fare de du policistoj. De ANEB gvidis la kurson Aimé-Patrick Manirakiza, estrarano de ILEI, Hassano Ntahonsigaye kaj Pamphile Bahati. Infana grupo paralele ludis kaj kantis sub la gvidado de Léopold Nzisabira.
Mirejo eksciis pri la kurso antaŭ kelkaj monatoj kaj povis organizi, ke la Asocio *Scio Sen Bariloj* subtenu ĝin finance. Poste ankaŭ ILEI kaj UEA subtenis la kurson. Patrick preparis detalan kursoplanon. Kiam Mirejo vidis ĝin, ŝi decidis transpreni la lecionon de la deka ĝis la dekdua horo ĉiun tagon dum kvin tagoj. Por ŝi tio estis unu horon pli frue pro malsamaj horzonoj. Do ŝi instalis grandan paperblokon en sia ĉambro kaj la gekolegoj en Burundo povis sekvi la kurson legante sur ŝia blanka tabulo. Ni estis rete kune, kvazaŭ en iu klasoĉambro. Ili ricevis la bazojn de nia lingvo kaj bone progresis. Ni nun klopodos resti en kontakto kun tiuj dudek geinstruistoj, cele al ilia progreso ĝis plena flua parolado. Tiam ili povos ekinstrui nian lingvon al siaj gelernantoj; tio donos prestiĝon al tiu homgrupo. Nun la membroj de ANEB vidos la ministrinon denove kaj provos ekrilati, danke al ŝi, kun la ministro pri edukado. Do la rilatoj naskiĝas kaj kreskas pozitive en ĉi tiu afrika lando.



Ni eksciis pri iliaj vivkondiĉoj: ili baraktas por trovi manĝaĵojn, por pagi la lernejon por siaj infanoj kaj ilia vivo estas vere malfacila. Ili estas la plej malriĉaj en malriĉa lando. Tio kortuŝas nin. Fakto estas, ke instrui nian lingvon gravas, sed multe pli gravas, ke la infanoj manĝu. Pro tio ni nun pripensas pri akiro de financoj por organizi po unu tagmanĝon por ĉiu infano en ĉiu enlerneja tago. La plej bona maniero por lukti kontraŭ infanlaboro estas sendi ilin al lernejo. La plej bona maniero sendi ilin al lernejo estas provizi manĝon en la lernejo por ĉiu infano. Nun ni esploras pri tiu progreso. Multaj infanoj iras al lernejo nur por ricevi manĝaĵojn.
Alia ideo naskiĝis: ili povus fabriki sunenergiajn fornojn, uzi ilin kaj vendi ilin. Tio havus pozitivan efikon sur la pluvivo de la arbaroj, ĉar oni uzos malpli da ligno por kuiri. Baza tuja bezono estas akiri por ili terenon, kie ili povos kreskigi legomojn por nutri la familiojn. Ni esploras, kiu membro de ANEB loĝas ne for de Nyabihanga kaj povus sekvi la evoluon propraokule kaj raporti.

Mireille GROSJEAN kaj Aimé-Patrick MANIRAKIZA

Ĉinio

Centro por Esploro kaj Informado pri Esperanto en Zaozhuang



La 26-an de decembro 2024, la vicprezidanto Li Muhai (*vd. surfote*) gvidis ceremonion por celebri la fakton, ke Zaozhuang-Universitato iĝis parto de la „Pensfabriko por eksterlandaj aferoj kaj disvolviĝo de la Provinco Shandong” specife kiel „Tutmonda Centro por Esploro kaj Informado pri Esperanto.” La honoro premias jam pli ol jardekon da Esperantaj agadoj en tiuj kampoj: gratulmesaĝoj venis de Esperanto-Asocioj tra la mondo, inkluzive de ILEI.

PEA solenas la Zamenhof-Tagon

La 12-an de decembro, Pekina Esperanto-Asocio (PEA) kunvenis por festi la Zamenhof-Tagon. Ĉeestis en la kunveno ankaŭ TEA-membroj kaj amikoj el Germanio kaj Svislando.




En la malgranda salono de la konstruaĵo, kie funkcias ĈEL, regis intensa etoso Esperanta, amika, internacia kaj kultura. La solenaĵo komenciĝis per parolado de la prezidantino s-ino YU Jianchao. Ŝi salutis la amikojn per konciza konigo de la Tago, ankaŭ de kulturo kaj la E-libro, kaj tuj poste prezentis du titolojn rekomenditajn de ILEI por la Tago de la E-libro. Ŝi sciigis, ke la du „titoloj” libriĝos probable venontjare, esperante ke ankoraŭ pli multaj homoj legos ilin. Sekve la vicprezidanto s-ino Chen Ji faris

paroladon. Ĝi temis pri la UK en Aruŝo, unuafoje en Afriko. La impresoj estas ankoraŭ freŝaj kaj la rakontado vere vekis intereson.
La veterano sinjoro Zhang Dali (Fortego) lanĉis ludon de vort-enigmoj al la ĉeestantoj, la solvantoj estis kuraĝigitaj per libroj aŭ poemaroj. La divenado kreis etoson plenan de gajo kaj ĝojo.
Amikoj el malproksimaj landoj, la germana sinjoro Rainer Kurz kaj la svislandaj gesinjoroj Liu Jun kaj Dieter Rooke, kunportis siajn rakontojn. Sinjoro Dieter Rooke, parolante pri sia sperto dum la afrika UK, eĉ dufoje ekspoziciis siajn eluziĝantajn ŝuojn, kiuj akompanis lin dum li grimpis sur Kilimanĝaron. Lia humuro kelkfoje ridigis la ĉeestantojn en la salono. Kaj Kurz rememoris sian viziton al Pekino antaŭ dek jaroj kaj montris fotojn, el kiuj nemalmultaj troviĝas en la „historia momento". Dume li prezentis per video Pasportan Servon kaj ebligis spekti la premiitan videon faritan de pekina junulo.
La tempo fulme pasis kaj tiam oni reciprokis la donacojn. Imponis la papertranĉilo kaj la portreto de Zamenhof fabrikita de la PEA-membro sinjorino Wang Lirong; ege plaĉis al amikoj la ruĝa ŝalo kun E-skribo de la Pekina Esperanto-Asocio.
En la agrabla etoso, sinjoro Zhang Yongle, ĉefsekretario de la Asocio, anoncis la festan „bankedon" aliloke.

YU Jianchao (Terana)

La Zamenhofa Tago en Zaozhuang

Por festi la Zamenhofan Tagon 2024 Shandong-a Esperanto-Asocio organizis du-tagan ret-kunvenon kun prelegoj de profesoroj de la Esperanta fako de la Zaozhuang-a Universitato. La 14-an de decembro Choi Manwon (Dekmil) klere prelegis pri la nomo de Zamenhof kaj pri la rilato inter liaj hilelismo kaj homaranismo.
La 15-an de decembro, kiu estas ankaŭ la Tago de la Esperanta Libro, mi prezentis la elektojn de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj por la tradicia Komuna Legado 2024. Ili estis la teatraĵo "1910" de Ĵenja Amis pri la vizito de Zamenhof al Nordameriko kaj la rondiranta rakonto „Pri viroj kaj kunikloj", kiun dum ĉi tiuj monatoj kunverkis 31 virinoj el 12 landoj (Armenio, Barato, Ĉinio, Francio, Italio, Japanio, Kanado, Koreio, Kroatio, Madagaskaro, Pollando kaj Svislando). Ĉiuj virinoj rajtas partopreni en tiu internacia kunlaboro kaj verkemulinoj estas tre bonvenaj sin anonci al mi. Krom la ĝisnuna teksto, libere elŝutebla el la retejo de ILEI, ekzistas ankaŭ tre mojosa voĉlegado de la itala samideanino Claudia Maggi, trovebla en la jutuba kanalo de EsperRadio.



Ĉar la rakonto estas la unua oficiale aprobita agado de la nove restariĝinta Komisiono pri Virina Agado de Universala Esperanto-Asocio, dum la kunsido estis la ŝanco paroli ankaŭ pri ĝiaj aliaj iniciatoj. Mi respondis al la demandoj de la tre scivolema publiko, kiu partoprenis el multaj partoj de Ĉinio, pri la celoj de la Komisiono, precipe rilate al la subteno de virinaj rajtoj en ĉiuj partoj de la mondo kaj ne nur en eŭropcentra perspektivo. Vigle organizis la du-tagan kunvenon en Zaozhuang la junaj instruistoj Li Bochuan (Briko) kaj Long Yunxia (Nuba), magistriĝintaj pri Interlingvistiko en Poznano.

Alessandra MADELLA


Francio

La franca esperantista kastelo Greziljono invitas al siaj kursoj en 2025:
2025-apr-18/27: PRINTEMPAS, intensivaj kursoj por ekzamenoj kun Zsófia Kóródy, Marion Quenut, Konstantin Tikhomirov, Paweł Fischer-Kotowski. gresillon.org/p
2025-jun-30/jul-10: Maratona Esperanto-kurso kun Dennis Keefe, Nedeljka Ložajić, Frank Lappe, ankaŭ por blinduloj, kun Internacia E-Konferenco. gresillon.org/m
2025-aŭg-24/29: Verda Naturisma Semajno, kursoj kun Thierry Spanjaard, Didier Loison: gresillon.org/n

2025-okt-24/nov-02: AŬTUNAS, kursoj kaj FEI-ekzameno kun Renée Triolle kaj aliaj. gresillon.org/au
Agendo de la sekvaj agadoj: gresillon.org/a - kontakto: kastelo@gresillon.org

Svislando

Nostalgio pri S-ro Claude Gacond (1931-2024)



S-ro Claude Gacond estis unu el la homoj, kiujn mi plej admiris kaj respektis en mia tuta vivo.
Mi ekkonis lin kaj lian edzinon Andrée en 2007, dum mi studadis pri la Esperanta kulturo kaj pri la historio de la Movado pere de la Koresponda Perfektiga Kurso de Boris Kolker. Fine de la somero, mi estis preparinta la taskojn de la Leciono 16a. La unua tasko estis tiu ĉi: “Imagu, ke vi partoprenis en Internaciaj Esperanto-kursoj en Svislando; revene vi rakontas en via Esperanto-klubo pri tiu lando kaj ties Esperanto-movado.” Hazarde, mia edzo kaj mi estis planintaj vojaĝon al Svislando post nur kelkaj semajnoj. Mi skribis al Boris, ke mi prokrastas tiun taskon ĝis nia reveno el la vojaĝo, ĉar mi volas priskribi realan partoprenon en unu el la kulturaj seminarioj de La Chaux-de-Fonds.
Hazarde mi ne trafis ajnan kulturan seminarion ĝuste en tiu periodo, sed kompense s-ro Gacond kune kun la tre kara s-ino Martine Schneller organizis por mi du belegajn neforgeseblajn tagojn. S-ro Gacond invitis min viziti la Kulturan Centron (CDELI), kie mi faris demandojn pri la portretoj kaj fotoj, kiuj dekoraciis la prelegsalonon. Tio instigis lin paroli abunde pri la vizioj de Kartezio kaj Leibnitz koncerne la neceson de iu internacia lingvo. Li ankaŭ parolis pri aliaj planitaj lingvoj, pri la Universalaj Kongresoj, pri la pioniroj de la Movado... En la salono ĉeestis nur du ravitaj spektantinoj: Martine kaj mi. Tamen li faris brilan fascinan prelegon, kvazaŭ li havis mil spektantojn. Forte impresis min lia entuziasmo, lia erudicio, lia optimismo koncerne la homan kapablon plibonigi tiun ĉi mondon, realigi tutmondan pacon kaj justecon, forigi antaŭjuĝojn ... S-ro Gacond estis ĝisosta instruisto kaj edukisto, kiu tutkore fidis la homan kapablon eduki kaj edukiĝi. Li ne nur revis, sed ankaŭ agis por realigi siajn revojn. Pro tio mi ege admiras lin kiel homon kaj kiel esperantiston.
Tiun vesperon oni invitis min al komuna vespermanĝo organizita de la esperantistoj de La Chaux-de-Fonds, kie mi ekkonis s-inon Andrée kaj aliajn

ontajn geamikojn. Kaj la sekvan tagon, gesignoroj Gacond invitis min ekskursi tra la belega montara ĉirkaŭaĵo. Ili akompanis min al Le Locle, kie ni vizitis ĉarman muzeon pri horloĝoj kaj aŭtomatoj. Interalie, ni povis admiri kaj eĉ aŭskulti tie la aŭtomatan birdon, kiu inspiris la verkiston Hans Christian Andersen por krei sian faman fabelon „La najtingalo". Gesinjoroj Gacond kondutis tiom afable kun mi, ili donacis al mi tiom da tempo kaj atento, ke mi sentis min embarasita, ĉar mi faris absolute nenion por meriti tion.

Mi rakontis ĉi tie mallonge nur pri mia unua renkonto kun s-ro Gacond kaj lia kara edzino. Okaze de aliaj vizitoj al La Chaux-de-Fonds, mi ĉeestis kvin kulturajn seminariojn kaj plurajn ekskursojn. Mi ŝuldas al s-ro Gacond multajn el la plej belaj kaj signifoplenaj tagoj de mia vivo. Kun granda danko kaj amo mi ĉiam memoros lin.

Luiza CAROL

NdlR: SES kaj CDELI kune organizas memorkunvenon pri Claude Gacond la 5-an de aprilo en la Urba Biblioteko (CDELI) de La Chaux-de-Fonds.

.

Fino de la Esperanto-fako de KAVAPECH

Kiel videblas de la kompleta nomo de la mallongigo KAVA-PECH *Kongresová A Vzdělávací Agentura PEtra CHrdleho*, (Kongresa kaj Kleriga Agentejo de Petr Chrdle), ĝia celo origine ne estis eldonado de libroj. La agentejon mi fondis en la jaro 1991, sed jam en la jaro 1992 mi eldonis la unuan libron. Ne pro emo fariĝi eldonisto, sed pro bezono mem eldonadi la prelegkolektojn el de mi organizitaj fakaj eventoj. Ili estis plejparte en la ĉeĥa kaj germana; nur pli poste, kiam mi sentis min ekonomie sufiĉe forta por riski malprofiton, mi komencis agadi ankaŭ por esperantistoj. La unuaj Esperanto-aranĝoj estis la kolokvo por Akademio de Esperanto (AdE) kun eldonita prelegkolekto *La stato kaj estonteco de Esperanto* kaj la kongreso de SAT en Strážnice kun ĝia antaŭkongreso en Prago paralele kun la AdE-kolokvo.

Mi ankaŭ kulaboris kun ILEI. Dufoje mi organizis ILEI-konferencon (en Karlovy Vary 1999 kaj eBratislava 2004) kaj ene de InPaSem (de mi regule organizita ĉiun duan jaron **In**ternacia **Pa**roliga **Sem**inario) 2006 mi organizis la lingvajn ekzamenojn de ILEI/UEA (ekzamenantoj Stefan MacGill, Albrecht Kronenberger kaj Miroslav Malovec).

Poste, la eldonado de libroj fariĝis hobio por ni (mi kaj mia edzino Stanjo[2]), do ni komencis, krom nia ĉefa organiza agado, eldonadi ankaŭ aliajn librojn, ne nur prelegkolektojn, inkluzive de tiuj en Esperanto. Ĝis la jaro 2024 KAVA-PECH eldonis 262 librojn, el ili 108 en Esperanto. Do tiuj 108 libroj kreas la Esperanto-fakon de la eldonejo. Klare, ne ĉiuj estas ankoraŭ enstoke.



(Surfote maldekstre: Rob kaj Mirejo dum la 65-a ILEI-konferenco)

En produktado de ĉeĥaj kaj Esperantaj libroj ne estas granda diferenco. Male estas tre granda diferenco en ilia distribuado. Por la ĉeĥaj mi havas ekskluzivan librodistribuanton KOSMAS, do tio postulas de mi preskaŭ neniun administran pezon. Ĉiumonate, laŭ la anonco pri la nombro de la venditaj libroj, mi sendas al KOSMAS fakturon. La librotenado estas simpla, same kiel la impostdeklaroj (kvarfoje jare pri AVI[2] kaj unufoje jare pri gajno/malgajno).

Tute aliaj estas burokrataĵoj kunigitaj kun la distribuo de la libroj en Esperanto, plejparte eksterlanden. Eĉ se en ridinde malgrandaj kvantoj, ĝi devas plenumi, precipe ĉe AVI-pagantoj, ĉiujn trajtojn de la internacia komerco: apartan evidentecon de la vendoj ekster Ĉeĥion, aparte al EU-landoj, se la partnero estas ankaŭ AVI-paganto (ekzemple UEA, germana libroservo, …) kaj ĉiumonate deklari evidentecan devon rilate al la AVI-pagantoj; sed ankaŭ al eksterEU-landoj, kiu krome devas esti dogane pritraktata plenumo de jure devigaj statistikaĵoj (sub altaj punminacoj) ktp.

Kaj, ĉiu korespondado kun la klientoj okazas en Esperanto. Kiun dornoplenan vojon mi devis trairi, antaŭ ol la financofico komencis akcepti

[2] Stanjo = Stanislava Chrdlová (1954–2000) estis ne nur mia edzino, sed ankaŭ la plej proksima kunlaborantino ene de KAVA-PECH kaj kunaŭtorino de la lernolibro *Esperantem za tři měsíce* (Per Esperanto post tri monatoj), ekde la kvara eldono plilarĝigita al *Esperanto od A do Z*.

[2] AVI = Aldonvalora imposto

la dokumentojn en Esperanto, mi priskribis en la verko *Mia vivo kun Esperanto.*

Tion ĉion mi havis en mia cerbo, kiam mi batalis kontraŭ la morto dum du sinsekvaj danĝeraj malsanoj post kovimo kaj ĉe la notario, kiam mi faris testamenton. Mia plej aĝa filino, kiu heredos mian firmaon, certe ĝin likvidos, sed antaŭ tio ŝi devos plenumi ĉiujn restantajn kontraktojn kaj devontigojn. Tio certe ne estos problemo rilate al la ĉeĥaj libroj, sed terure komplika por ŝi, nekonanto de komercaj leĝoj, des pli, ĉar ŝi ne scipovas Esperanton.

Tial mi decidis laŭeble baldaŭ liberiĝi de la Esperanto-fako, tamen ne volis likvidi la restantajn librojn en Esperanto. Mi do strebis trovi iun, kiu transprenus ilin, sed ne trovis. Tamen ekbrilis eĉ pli bona solvo: François Bolduc el la kanada Montrealo, kiu ĝuste en tiu tempo planis fondi eldonejon por eldonadi Esperanto-librojn, ofertis al mi, ke li transprenos mian eldonejon kaj daŭrigos ĝian agadon. Ni faris kontrakton kaj lasigis ĝin kontroli ĉe juristoj, por ke ĝi kontraŭu nek la ĉeĥan, nek la kanadan juron.

Kaj tiel okazis. Li ankaŭ aĉetis kontraŭ forte rabatitaj prezoj profunde sub la produktokostoj (klare, ĉar plejparton li ne sukcesos disvendi) la reston de la stoko de la libroj en Esperanto. Parton mi sendis al li en Montrealon, parton transprenis persone lia kunlaborantino el Budapeŝto Stela Besenyei-Merger.

Provizore, ĝis la nova eldonejo *Les éditions KAVA-PECH* havos propran retejon, la mendojn de eksterlande plu kolektos mia retejo *https//kava-pech.cz/esperanto* kaj mi plusendos ilin al Montrealo kaj Budapeŝto. Jen la retadreso de mia daŭriganto *Les Éditions KAVA-PECH*: *kavapech1@gmail.com.*

Fine mi volas ĝustigi misfamojn pri mi, kiuj venis al miaj oreloj:

1-e, mi **ne** kabeiĝas[3], male mi nun havos, pro malpli da burokrataĵoj, espereble pli da tempo por esperantumi: vizitadi la Esperanto-aranĝojn, verki…

2-e, KAVA-PECH **ne** bankrotis kaj ĝi plu ekzistos, nur ne plu agos internacie pro la supre menciitaj kialoj,

[3] Kabeiĝi: subite de fervora esperantisteco komplete forlasi Esperanton. Laŭ la fama fervora Esperanto-verkisto, tradukanto, AdE-vicprezidanto kaj movadano KABE (Kazimierz Bein, 1872–1959, kiu en la jaro 1911 subite sen ajna klarigo komplete malaperis el la movado).

3-e, mi **ne** estas mortanta (almenaŭ mi kredas!) kaj danke al Dio kaj al miaj kuracistoj mi jam denove fartas relative bone. Jes, mi devas glutadi amason da medikamentoj kaj regule subiĝi al diversaj sankontroloj, sed sciante, ke kun malnova aŭto oni devas ofte vizitadi aŭtoriparejon, mi komprenas, ke kun maljuna korpo mi devas vizitadi simile la korporiparejojn. Sed tamen mi povas plu ĝui la vivon kaj Esperanton, eĉ se kun iuj limigoj.

Petro CHRDLE, chrdle@kava-pech.cz

Novaĵoj de Stefan MacGill

AMO en Kroatio, Pollando kaj tra Afriko
AMO-seminarioj okazos en Kroatio februare pri Amikeco kaj novembre pri Literaturo. Ambaŭ prizorgataj de la AMO-komisionano Marija Beloŝevič. Seminario estas planata en Pollando sub la prizorgo de la komisionano Małgosia Komarnicka, eble en majo.

Sekvas raporto de Jérémie SABIYUMVA, estrarano de UEA pri AMO, pri la planoj en Afriko:
„Mi kore dankas al vi ĉiuj pro via sindonemo por kunorganizi AMO-seminariojn. En 2025, okazos AMO-seminario en DR Kongo, Kenjo kaj Gambio kun la ĉefa temo: Organizado de la movado. Subtemoj estas:

- Mastrumado de kluboj
- Organizado de kunsidoj
- Organizado de ĉeestaj kluboj en lernejoj
- Organizado de retaj kursoj
- Solvado de konfliktoj

Por bona organizado, tiujn seminariojn kunorganizos la Afrika komisiono. Aliflanke, mi sentas bezonon organizi virtualajn AMO-seminariojn pri mastrumtemoj por havi pli da aktivuloj, la esperantistaro tion bezonas."

Kvardek kvar EKO-komunikoj en la retejo de ILEI
Tiujn vi povas aliri en https://www.ilei.info/ sub la rubriko: Agado>EKO. Ili regule kaj forte informis ankaŭ pri la aktivaĵoj ene de ILEI. En 2025 jam disiris kvar komunikoj kun unu plia en preparo. Budapeŝto aktive kontribuas al la movada komunikado.

Dua alvoko al la ILEI-kongreso 2025 – Beogrado, Serbio

Serbia Esperanto-Ligo (SEL) kaj ILEI kore invitas vin al la **58-a kongreso de ILEI**, kiu okazos unuafoje **en Beogrado, de la 19-a ĝis la 26-a de julio 2025**. Ĉi tiu evento estos neforgesebla okazo por kunveni, lerni kaj ĝui la unikan etoson de la ĉefurbo de Serbio.

La ĉefa temo de la kongreso kaj ties simpozio estas: **Artefarita intelekto kaj lingvolernado**.

Kial vi nepre partoprenu?

Ĉiu partoprenanto trovos ion por si. Vi renkontos malnovajn kaj novajn geamikojn, lernos ion novan kaj lernigos al la aliaj ion el viaj spertoj. Abundos la turisma kaj kultur-arta programo en la tradicia amika etoso de la ĉefevento de ILEI.

Ĉu vi estas ILEI-membro aŭ ne, ĉiuj estas bonvenaj! Ni bonvenigas ankaŭ lernantojn, homojn, kiuj interesiĝas pri instruado kaj ĝenerale ĉiujn esperantistojn de iu ajn lingvo-nivelo inkluzive akompanantojn kaj komencantojn.

Kotizrabatoj: Ne maltrafu la ŝancon ĝui malaltajn kotizojn de la unua aliĝperiodo, ĝis la fino de marto 2025!



Kongresejo kaj loĝado – Hotelo Palace

Ĉio en unu loko (kongresejo, loĝado, manĝoj) kreas idealan medion por grupa spirito kaj kunlabora etoso. La centjaran historion de la kvarstela Hotelo „Palace" (Palas) akompanas modernaj organizo kaj ekipaĵo, igante ĝin unu el la plej famaj klasikaj hoteloj de Beogrado.

La hotelo situas en la malnova urbocentro, proksime de la ĉefa piedira zono, la Knez-Mihailova Strato. Ĝia pozicio estas tre favora, en trankvila parto de la urbo, najbare de historiaj kaj kulturaj vidindaĵoj, urbaj kaj ŝtataj institucioj, muzeoj, teatroj, kinejoj, butikcentroj, la Beograda fortikaĵo kaj Skadarlija – la fama bohema kvartalo. Ĝi estas facile atingebla de la Beograda Flughaveno „Nikola Tesla".

La hotelo disponigas kvar diversgrandajn kaj diverstipajn salonojn por la kongresaj programeroj.

Loĝ- kaj manĝmendilo estas alirebla en la kongresa retejo, retejo de ILEI, kaj ankaŭ helpe de la ĉi tie aldonita QR-kodo.

Kie vi trovas pliajn informojn?

- Retejo de la kongreso: *2025.kongreso.org* (alklaku al la emblemo de ILEI por pluiri al la ĉefa paĝo) aŭ *2025.kongreso.org/ilei-chefa.html*
- Rekta ligilo al la aliĝilo: *2025.kongreso.org/alighilo.html*
- Retejo de ILEI: *ilei.info*
- Eventaservo: *eventaservo.org/e/ILEI-58*
- Telegram-grupo: *t.me/Beogrado2025*

Se vi havas demandojn, ne hezitu kontakti nin: *ilei<ĉe>kongreso.org, serbialigo<ĉe>gmail.com* aŭ *laslo.az<ĉe>gmail.com*. Al la samaj adresoj vi povas sendi viajn kontribuproponojn.

Programkontribuoj

Ni antaŭĝojas pri viaj partopreno kaj kunlaboro por igi ĉi tiun kongreson memorinda! Proponu viajn kontribuaĵojn por pli riĉa kaj pli ĝuinda programo! Ekzemple, kolegino el Korea Respubliko proponas kurson pri koreaj dancoj. Se vi deziras dividi viajn spertojn pri instruado de Esperanto aŭ edukado per Esperanto, gvidi laborgrupon, atelieron aŭ diskutrondon pri grava temo el la vivo de ILEI, gvidi kurson por komencantoj aŭ progresantoj, prelegi en la simpozio pri la kongresa temo, aŭ pri alia temo ekstersimpozie, aŭ vi pretas kontribui al la kultur-arta programo, prezenti vian lingvon en la

lingva festivalo kaj vian gastronomion dum la interkona frandvespero – bonvolu indiki tion en via aliĝilo, aŭ skribi al la ĉi-supre indikitaj adresoj de la organizantoj.

Konatiĝu kun la kongresurbo

Per duontagaj kaj promenaj ekskursoj vi malkovros la ĉarmon de unu el la plej malnovaj ĉefurboj de Eŭropo, la tamen ĉiam juna kaj gastama Beogrado. La komplekso de la Beograda fortikaĵo kaj parko Kalemegdan, la Nacia muzeo kun eksponaĵoj de la prahistorio ĝis la modernaj artoj, arkitekturaj perloj jam je promendistanco de la kongresejo, la Muzeo de Nikola Tesla kun la plej granda en la mondo kolekto de aŭtentikaj dokumentoj kaj objektoj el la verkaro kaj vivo de Tesla, la monto Avala kaj 203 metrojn alta televida turo kun restoracio je la 119-a kaj elvidejo je la 122-a metro de ĝia alto, estas nur kelkaj el la vizitotaj vidindaĵoj de la kongresurbo.



Enrigardu la kulturon kaj naturon de la kongreslando

Kvar tuttagaj ekskursoj proksimigos vin al la nacia spirito, historia heredaĵo, natura kaj kultura riĉeco de Serbio. Du aŭ tri estos ofertitaj por la ekskursa tago – merkredo. Ankaŭ en aliaj tagoj vi povos ekskursi se tio plaĉos al vi pli ol tiutaga programo en la kongresejo. La turisma oferto kun mendilo estos afiŝita tra la kutimaj komunikkanaloj.

Unu el la ekskursoj gvidos al **Novi Sad**, la ĉefurbo de Vojvodino (la norda aŭtonoma provinco de Serbio), kun la impona **Petrovaradina fortikaĵo** (*vd la foton sur p.34.*), kiu siatempe estis nekonkerebla per la tiama milita tekniko, sed hodiaŭ estas konata kiel loko de muzeoj, arkivoj, atelieroj kaj, ekde la jaro 2001, okazejo de la fama muzikfestivalo **Exit**. La ekskursantoj ekkonos ankaŭ la ĉarmon de la proksima urbeto **Sremski Karlovci** kaj naturan riĉon de la montaro **Fruŝka Gora**, unu el la malmultaj en la ebena Panonio, kun trezorejoj de la serba klero kaj kulturo: la plej aĝa serba gimnazio el la 18-a jarcento, Patriarka palaco kaj Teologia seminario en Sremski Karlovci, kaj la monaĥejo **Kruŝedol** el la 16-a jarcento inter la deklivoj de Fruŝka Gora.

La dua tuttaga ekskurso gvidos suden, al **Kragujevac**, la unua ĉefurbo de Serbio post la liberiĝo elsub la Otomana imperio komence de la 19-a jarcento. Inter la ekskursceloj estas:

- La memorkomplekso **Oktobro de Kragujevac**, dediĉita al la viktimoj de la nazia teroro en la Dua mondmilito, kaj aliaj vidindaĵoj en la urbo;
- La proksima urbo **Topola** kun la preĝej-maŭzoleo de la dinastio Karadjordjeviĉ sur la monto **Oplenac**, ornamita per 752 mozaikaj replikoj de famaj freskoj el serbaj mezepokaj monaĥejoj sur 3 500 kvadrataj metroj de la interna mura surfaco, kiuj konsistas el 40 milionoj da diverskoloraj vitraj kubetoj en 15 000 nuancoj;
- La **Fortikaĵo de Karadjordje** el la Unua serba ribelo kontraŭ turkoj (1804) kaj la muzeo en la **domo de Reĝo Petro la 1-a** en Topola;
- Tipa serbia vilaĝo kun tradicia tagmanĝo en vilaĝfamilia etoso.

La ekskurso orienten, al **Smederevo** kaj **Viminacium,** kunigos la mezepokan historion de Serbio kun la tempo, kiam plejparto de ĝia nuna teritorio apartenis al la romia provinco Supra Mezio (Moesia Superior), kaj kun la tempoj de mamutoj. En Smederevo, 50 km for de Beogrado, sur la dekstra bordo de Danubo, staras unu el la plej grandaj mezepokaj fortikaĵoj en Eŭropo. La **muzeo de Smederevo** gardas prinaturan, arkeologian, historian, numismatikan, etnologian kaj belartan kolektojn. En **Viminacium** vi esploros **arkeologian parkon** kun romia armea tendaro, **gladiatora areno**, antikvaj tomboj kaj **mamutparko** – vera vojaĝo reen al la romia epoko kun rava enrigardo en miocenan prahistorion de mamuloj.

Per la ekskurso sudorienten al la regiono de la rivero **Resava**, malkovru la naturan kaj historian riĉecon de Serbio je nur 140 km for de Beogrado kaj paŝu profunde en la geologian historion de la Tero.

- Vizitu la monaĥejon **Manasija**, arkitekturan kaj freskoartan majstroverkon de serba mezepoka kulturo, sidejon de la fama Resava Skolo – manskriba kaj tradukista ateliero, siatempa centro de spirita kulturo kaj klereco.
- Esploru la imponan **Kavernon de Resava**, kun ĝiaj stalaktitoj, stalagmitoj kaj ŝtoniĝintaj akvofaloj en koloroj ruĝa, flava kaj blanka, aĝaj 45 milionojn da jaroj.
- Miru pri la pitoreska **Veliki Buk**, la „Granda Bruo", unu el la plej altaj kaj plej belaj akvofaloj en Serbio.

Karavane al la UK en Brno

Por sabato, la 26-a de julio, estas planata bustransporto al Brno kun ekiro post la matenmanĝo por atingi la posttagmezajn programerojn tie. Ĝi estos mendebla kune kun aliaj turismaj programeroj.

Por la LKK: Aranka LASLO, Laura BRAZZABENI,
Radojica PETROVIĆ, Bojan VELIČKOVIĆ

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (*prez., dumtempe pluservanta ĝis la venonta elekto*)
Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Aristophio Alves Filho.
Kontrola: Simon Smits, Nvard Manveljan.
Lerneja: Julián Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Oberrauch, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.
Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill.
Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny.
Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Gong Xiaofeng „Arko", Goro Kimura, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Kristin Tytgat, Vicente Manzano-Arrondo, Radojica Petrović, Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 15)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, *info@ikso.net*. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: *http://www.ikso.net/eo/.*
Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: *redaktanto@edukado.net.*

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983. Trejnsesioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, *zsofia.korody@esperanto.de.*

IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la retpaĝon de UEA.*

TEJO (http://www.tejo.org/): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Aimé-Patrick Manirakiza**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Albert Stalin Garrido.**

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, *www.uea.org*. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Ahmad Reza Mamduhi.** Observanto de UEA ĉe ILEI: **Duncan Charters.**

LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj): prez. **Nedeljka Ložajić**, *nedeljkalozajic@gmail.com*.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE *(Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo)* Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**.

FIPLV *(Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj)*

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro.**

Unesko (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Alessandra Madella,** *a.madella@tiscali.it*, **Didier Janot,** *didier.janot@gmail.com,* **Emmanuel Desbrières** kaj **Maximiliano Garcia**.

kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 25 € en A-landoj kaj 12,50 € en B-landoj, kun ricevo de 4 paperaj kaj bitaj numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al la reta versio de IPR membreco kostas 12,50 € por la A-landoj kaj 6,25 € por la B-landoj. Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan IPR kaj paperan *Juna Amiko* (JA). Tio kostas por A-landanoj 40 € kaj por B-landanoj 22,50 €. Abono de JA papera (kune kun la bita) kostas 18 € en A-lando, 13 € en B-lando. Abono de JA bita kostas 11 € en A-lando, 7 € en B-lando. **Lando-kategorioj: B-landoj**: iamaj socialismaj landoj de Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Resp.), Afriko, Ameriko (escepte de Usono kaj Kanado), Kiribati, Papuo-Nov-Gvineo, Solomonoj, Vanuatuo en Oceanio. **A-landoj**: ĉiuj landoj escepte de tiuj de kategorio B. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por JA akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al **Karine ARAKELJAN**, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio, *ilei.kasisto@gmail.com*. Bv klare indiki la celon de via pago.

La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de via sekciestro aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la sekciestro alvenos al ILEI kune kun tiuj de la aliaj membroj de la sekcio. Vi jam estos en la sekcia listo kaj ne devos mem sendi la aliĝ- aŭ la abon-formularon.
b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Se vi ne mem posedas UEA-konton, por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Se vi ne estas en la sekcia listo, bonvolu mem sendi la aliĝ- aŭ la abon-formularon (aliĝilo: https://www.ilei.info/Aligxilo.pdf; abon-formularo por *Juna Amiko*: https://www.ilei.info/Juna_Amiko.pdf). Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al la ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 30 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.
* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub la numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).
* Retpaĝo de ILEI: *http://www.ilei.info*.

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Torhoutsesteenweg 453/0003, BE-8400 Oostende*. **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario, jozefo.nemeth@gmail.com*, tel*: (+36-70) 931-0530.* Peranto de ILEI kadre de LIBE: Olena Poshivana, *olenaposivana@gmail.com*.
La adreso de nia arkivo: https://www.ilei.info/revuoj/ipr-arkivo.php.
Ni fermis la nunan numeron la 15-an de januaro 2025,
redaktofino por la sekva numero: la 15-an de aprilo 2025.

SEKCIOJ DE ILEI

Albanio: Bardhyl SELIMI, Rruga Fortuzi, nd.9, h.1, ap. 3, AL-1016 Tirana, *bselimi@gmail.com*
Armenio: Lida ELBAKJAN, Moldovakan 26/2, kv.52, AM-375062 Erevan, *lidaelb@yahoo.com*
Barato: Arikapalli Giridhar RAO, Azim Premji University, Survey No. 66, Burugunte Village, Bikkanahalli Main Road, Sarjapura, Bengaluru 562125, India, *rao.giridhar@apu.edu.in*

Belgio: Marc CUFFEZ, Torhoutsesteenweg 453/0003, BE-8400 Oostende, *flandrio@hotmail.be*
Brazilo: Aristophio Andrade ALVES FILHO, Rua B-55, N° 85, Conj. B. Bentes 1, Q. B-55, Benedito Bentes, Maceió, AL, Brasil, BR-57085-748, *esperantomaceio@yahoo.com.br*
Bulgario: Mariana EVLOGIEVA (komitatano), *ileibg@espereto.com*
Burundo: Gilbert NDIHOKUBWAYO, BP 7072 Buĵumburo, *gigi.kadi@gmail.com*
Ĉinio: WEI Yubin „Jado" Baiyangshujie Xiaoxue, Taiyuan Shanxi, CN-030003, *ilei_cxinio@163.com*
Danio: Ileana SCHRØDER, Vestavej 4, DK 2770 Kastrup, *ileana.schroder@mail.dk*
Francio: Didier JANOT, 3 rue Élisa Lemonnier, FR-75012 Paris, *didier.janot@gmail.com, https://eventaservo.org/o/ILEI-Francio*
Hungario: József NÉMETH, Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász, *jozefo.nemeth@gmail.com*
Germanio: Zsófia KÓRÓDY, Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, *zsofia.korody@esperanto.de*
Indonezio: Ilia Sumilfia DEWI, Perumahaan, Pejuang, Pratama, Blok L, no. 11, RT/RW 003/006, ID-Bekasi, Jawa Barat, *ilia.dewi@gmail.com*
Irano: Ahmad Reza MAMDUHI, Nr. 9 K. Iraj, Kh. Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-Afshar, Kh. Vahid Dastgerdi, IR-19166-13514 Tehran, *mamduhi@gmail.com*
Italio: Luigia OBERRAUCH MADELLA, via Prampolini 8, IT-43122 Parma, *esperoenparmo2020@yahoo.com*
Japanio: ISIKAWA Tieko, Tate 2-4-4-304, JP-353-0006 Siki-si, Saitama-ken, *tiekosanjo_103@bj8.so-net.ne.jp*
Kenjo: Gilbert SIMIYU SIKALA, P.O. Box 236-50202 Chwele, Bungoma, Okcidenta, Kenjo, *glbsimiyu@gmail.com*
Kongo DR: Joel MUHIRE, Po Box 08 ug, Bunagana-kisoro, Ugando, *joelmuhire0@gmail.com*
Korea Resp.: CHO Weonseok, *vivanta58@hanmail.net*
Kroatio/KEL: Marija JERKOVIĆ, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, *mjerkovic@net.hr*
Kroatio/KEU: Svijetlana AKIK, Franje Malnara 52, HR-10000 Zagreb, *ilei@hes-keu.hr*
Kubo: Julián HERNÁNDEZ ANGULO, Vista Alegre 264 e/ Juan Bruno Zayas y Luz Caballero, Víbora, 10 de Octubre, La Habana, *hernandezangulojulian@gmail.com*
Madagaskaro: Miora RAVELOHARISON, Lot II N 59 RA, Bis, Analamahitsy Antananarivo, *le.myrhe@gmail.com*
Mongolio: Khorloo TSERENDEJID, MN- Ulaanbaatar bayangol district, khoroo 24, 42-1-62, *tserendjd@yahoo.com*
Nederlando: Robert MOERBEEK, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk, *RobMoerbk@proton.me*
Pollando: Magdalena TATARA, ul. Grzegórzecka 74/4, PL-31-559 Kraków, *mtatara@gmail.com*
Rumanio: Mihai TRIFOI, Str. Principală, Bl.1 Ap.3, RO-527116 Bixad/Jud. Covasna, *mihaitrifoi@yahoo.com*
Rusio: Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, *lena_espero@mail.ru*
Senegalo: Lafi Charles DIATTA, BP 17935 Dakar-Liberté/Dakar, *lafi charlesd@gmail.com*
Serbio: Aranka LASLO, Imotska 34. RS-24000 Subotica, *laslo.az@gmail.com*
Svedio: Sten SVENONIUS, Vendelsfridsgatan 4 c, SE 21764 MALMÖ, *ilei-se@outlook.com*
Svislando: Mireille GROSJEAN, Chapeau-Rablé 52, CH-2300 La Chaux-de-Fonds, *mirejo.mireille@gmail.com*

Tanzanio: Mulele Samwel MBASSA, Box 25, Bunda - Tanzanio. Poŝtel: +255786 819 767, +255758 176 722, *mulelembassa@gmail.com*
Togolando: KOFFI GBEGLO, 07 BP. 13169 Lome 07, Lomé- TOGO, *esp.togo@gmail.com*
Ukrainio: Nina DANYLYUK, pr. Sobornosti, 32, Log. 108 UA-43026 U. Lucjk, *nina_daniljuk@ukr.net*
Usono kaj Kanado: William B. HARRIS, 4 Edgecomb Ct, Portland ME 04013 USA, *wb_harris@hotmail.com*

REPREZENTANTOJ

Aŭstralio / Nov-Zelando: Penelope VOS, 50 Victoria St, Cooma, NSW, Australia, *penny@mondeto.com*
Britio: Renato CORSETTI, 22, St. Pancras Court, High Road, London N2 9AE, UK/Britujo, *renato.corsetti@gmx.com*
Finnlando: Sylvia HÄMÄLÄINEN, F.E. Sillanpään katu 2 C 46, FI-33230 Tampere, *sylvia.h@kolumbus.fi*
Ganao: Alfred Kobina ARTHUR, P.O. Box CT 7432, Cantonments, GH-Accra, *ctrcgh@gmail.com*
Hispanio: Luis Eduardo BERDOR REMON, Pablo Iglesias 41, 4 B, ES-50018 Zaragoza, *eduardo.berdor@gmail.com*
Pakistano: Adeel Mahmood BUTT, Ward No. 11, near M.C. High School, PK-39100 Nankana Sahib, *interlingvisto@gmail.com*
Portugalio: Luna M. SILVA, *luna@esperanto.pt*
Slovenio: Peter GRBEC, Sv. Peter 142, SI-6333 Sv. Peter, *peter.grbec@gmail.com*
Tajvano: Reza KHEIRKHAH, Chung Ching Road, No. 105, TW-Pingtung city, 900-73, *rezamenhof@yahoo.com*
Vjetnamio: Hoan Thi TRAN, Xom 11 – Yen Loc – Kim Son, VN-430000 Ninh Bính, *hoantran37@gmail.com*
Zimbabvo: Benjamin Asende KABWE, Tongogara Post office. P.O. Box 228, Chipinge, Manicaland, Zimbabwe, *benjaminkas52@gmail.com*

KONTAKTPERSONOJ

Aŭstrio: Walter KLAG, Vieno, *esperanto@chello.at*
Benino: Latifou GBADAMASSI, BP302 Lokossa (Mono), République du Benin, Afrique de l'Ouest, *latifougbadamassi@yahoo.fr*
Israelo: Luiza CAROL, str. Bnei Binyamin 53, apt 12, Netanya IL-4201997, *luizacarol1947@gmail.com*
Kostariko: Hugo MORA POLTRONIERI, Apartado 4981, CR-1000 San José, *tikoguau@gmail.com*
Malio: Mbamoussa Keita, <keitambamoussa@yahoo.fr>, BP 2382, Bamako
Litovio: Gražina OPULSKIENĖ, Obuoliuko 42, Mažeikiai LT-89312, *grazopul@yahoo.com*
Norvegio: Douglas DRAPER, Esperanto, Olaf Schous vei 18, NO-0572 *Oslo, oficejo@esperanto.no*
Uzbekio: Anatolij IONESOV, P.O. Box 76, UZ-140100 Samarkand, *imps86@yahoo.com*
Venezuelo: Asociación Venezolana de E-o, Jezer DORANTE, Apartado postal 47675, Caracas 1041-A, VE, *jezerdorante@gmail.com*